Nova estrarano kaj oficiala registriĝo

Karaj amikoj,
enkonduke al ĉi numero de Scienca Revuo, ni volas doni al vi kelkajn informojn pri la asocia vivo de ISAE, al kiu vi estas varme invitita aktive partopreni.

Grava novaĵo rilatas al la membroj de la estraro. Al ĝi aliĝis Alga Guernieri, el Milano, Italio, kiel sekretario kaj membromastrumanto. Alga estas profesia grafologistino, kaj ŝi verkis artikolojn pri Esperanto kaj grafologiaj aspektoj de eminentaj esperantistoj, inkluzive de la Majstro Zamenhof, en fakaj neesperantistaj revuoj. Ŝi havas multe da sperto en membromastrumado, sukcese laborinte dum pluraj jaroj en la oficejo de Itala Esperanto-Federacio.

El la burokrata vidpunkto, ĝojiga informo estas la oficiala enskribo de la asocio ĉe la nederlanda komerca ĉambro. Tiel ISAE nun estas oficiale agnoskita organizo, kaj povas pli facile rilati kun aliaj samcelaj organizoj ekster la E-niĉo, kaj sin prezenti al instancoj por peti subtenon por siaj agadoj. Elkoraj dankoj iru al niaj nederlandloĝantaj amikoj, Nico Huurman kaj Katalin Kovats, kiuj helpis kune kun la Centra Oficejo de Univesala Esperanto Asocio, aranĝi ĉiujn necesajn burokrataĵojn.

Bondezirante fruktodonan legadon, ni ankaŭ samtempe invitas vin kontribui al la vivo de ISAE, per via sciencamika pasio kaj intereso!

nome de la estraro de ISAE, Francesco Maurelli